

# BULTENO

GERMANA  
ESPERANTA  
FERVOJISTA  
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung  
deutscher Eisenbahner-Esperantisten  
im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 1

Januaro/Februaro 1972

## 24-a Kongreso de Internacia Fervoja Esperanto-Federacio Al Lugano, renkonte al aktiva printempo



### Lugano — merkato sub la portikoj de Via Pessina

Lugano, ĉe lago de Lugano, estas la brilpunkto de Tiĉino, kiu ne konas ekstremajn sezonojn. Ĝiaj preferoj estas egaliga klimato, la arttrezoroj kaj neelĉerpebla elekto da ekskurs- kaj migradeblecoj. Unua vagado tra la urbo kun ĝiaj pitoreskaj arkadoj, mirindaj renesancaj kaj barokaj preĝejoj kondukos nin al la lagopromenejo, ornamita per palmoj kaj floroj. La nova urbparto montras modernajn hotelojn, sed tuj ni konstatas, ke Lugano posedas ne sole luksajn hotelojn por la superaj dekmil homoj, sed ankaŭ komfortajn hotelojn plimodestprezajn, same restadejojn por turistoj kiuj emas pilgrimi. La eleganta Lugano ofertas samelegantan strandpromenejon, du sportcentrojn (unu kun halobanejo), diversajn kulturajn kaj

sportajn aranĝojn, hazardludejon, noktajn klubojn, diskotekojn, tenisejojn, golfon kaj la eblecon apliki ĉiujn alian somerajn sportojn.

Flanke de la urbo staras Monte Bré kaj Monte San Salvatore, kies suproj per funikularo estas senpene atingeblaj. Regule veturantaj ŝipoj interligas Lugano kun la romantikaj ĉelagaj vilaĝoj Gandria, Campione, Bissone, Melide (vizito de Swissminiature) kaj Morcote. De Brusino-Arsizio oni lasas sin suprenporti per telfero al Serpiano aŭ oni ĝuas veturadon per dentrada fervojo de Capolago al Monte Generoso aŭ pere de seĝtelfero de Miglieglia al Monte Lema, de ĉiuj tiuj montsupraĵoj sin prezentas admirinda panoramo trans Alpoj kaj Po-ebenaĵo.



Interesa estas ankaŭ etaj ekskursoj per aŭtobusoj al Sonvico, Tesserete kaj al Origlio-lago, aŭ pere de mallarĝspura fervojo al la Muzzana-lago kaj al Malcantone-regiono. Almenaŭ 100 da tiaj ekskursoj kun pli ol dek transportrimedoj

prezentas ĉiam novaĵojn kaj surprizajn impresojn. Lugano oni ne povas dum unu ferio elĉerpi, kaj ĝi estas fakte la ĝusta celo por aktiva ferio de dinamikaj homoj. Greutert

### Pri nia 24-a IFEF-kongreso en Lugano ni informas:

1. Vi ne bezonas pasporton, sed ne forgesu vian personan identeckarton (kontroli la validecon!).
2. La kongreskotizoj post la 1-a de februaro 1972 estas 50 sfr por IFEF-anoj po persono. Familianoj, pensiuloj, gejunuloj ĝis 20-jaraj pagas la duonon. Limtempo por via aliĝilo estas la 12-a de aprilo 1972 (dato de poŝtstampo). Post via pagado — vidu la klarigojn je la kapo de la aliĝilo — vi ricevos la kongreskarton per poŝto. Ĝi estas persona kaj ne anstataŭebla en kazo de perdo.
3. Via mono estas tute konvertebla. Vi povos ŝanĝi viajn germanajn markojn je via deziro, absolute nelimigita, en via hejmurbo — rekomendinda estas DVKB — aŭ en Svislando post via alveno. Momente estas la ŝanĝkurzo 1 sfr = 0,845 GM.
4. Konstanta adreso: 24-a Esperanto-Kongreso IFEF, Kurt Greutert, sekretario, CH-6512 Giubiasco.
5. En kadro de la BSW-prizorgardo por emerituloj estas eble subteni tiajn personojn el inter ni. Bonvolu informi ĝi je via distriktkomisiito.
6. Trajnbiletoj. Por fervojaj biletoj nepre mendu laŭ indikoj sur aliĝilo. De nordo tra Bellinzona-Lugano ĝis Chiasso aŭ pli se iu deziras post la kongreso daŭrigi la vojaĝon pli suden.
7. Kongresejo. Kongresejo estas „Padiglione Conza“, konstruaĵo kiu disponas pri sufiĉe da loko por ĉiuj niaj manifestacioj. Nur por filmoj kaj fakprelego ni antaŭvidas alian ejon.
8. Loĝado. Ĉiujn informojn rilate loĝado vi trovos sur la aliĝilo. Bonvolu klare respondi ĉiujn tiurilatajn demandojn, vi evitos miskomprenojn. Aliĝiloj jam estas distribuitaj. LKK disponas pri rezervitaj hotelĉambroj ek de sfr 11,— (de sfr 11,— ĝis 17,— maltmultaj eblecoj).
9. Kongresa lunĉo. La kongresa lunĉo okazos dimanĉon inter la Solena Malfermo kaj la Ekskurso. Ĝi ne estos bankedo, sed prezinda rapida kaj tamen kompleta manĝo (inkluzive servon kaj

¼ litron da vino). Dum festotagoj granda parto de memservaj restoracioj estas fermitaj, krom tio en la urbo estas ĉiam multaj turistoj el proksima Lombardio, pro tio ne eblos al tia homamaso kiel reprezentas ni kun niaj gekongresanoj, trovi lokon en proksimaj manĝejoj kaj samtempe esti rapide servota. Ni konsilas al ĉiuj mendi la kongresan lunĉon. Antaŭmendo estas nepre necesa. Kongresa lunĉo kostos sfr 12,—.

### Provizora kongresprogramo:

- Sabaton, 6. 5.: Akcepto de gekongresanoj Interkona vespero
- Dimanĉon, 7. 5.: Diservo Inaŭguro Ekskurso — Rondveturado ŝipe sur Lago de Lugano Koncerto
- Lundon, 8. 5.: Komitatkunsidoj Komisionaj kunsidoj Internacia Balo
- Mardon, 9. 5.: Komitatkunsido Ekskurso al Monte Generoso Libera vespero
- Merkredon, 10. 5.: Faka ekskurso al Chiasso, nova varstacio aŭ al Bellinzona, ĉefriparejo Piedpilkludo aŭ aliaj Junularaj aranĝoj Junulara Vespero
- Ĵaŭdon, 11. 5.: Plenkunsido Filmoj, Fakprelego Folkloro Vespero
- Vendredon, 12. 5.: Tuttaga ekskurso al Trafikdomo Luzern kun ŝipveturado Flüelen-Luzern Fino de la kongreso en Luzern.

### Post la kongreso:

Eblos plilongigi la restadon en Lugano. LKK povos peri restadon ankaŭ en Luzern, ja la tieaj samideanoj eĉ pretas organizi malgrandan programon se montriĝos sufiĉe da intereso.



## Kial BEFA kunvenis en Godinne?

Kie situas Godinne? Tiu ĉi demando okupis min, kiam mi aŭdis, ke niaj belgaj geamikoj elektis tiun lokon por sia jarkunveno. En la horaro mi ne trovis ĝin. Sed baldaŭ mi estis informita, ke temas pri loko 17 km for de Namur sur la linio Namur — Dinant. Tuj ekstaris antaŭ miaj okuloj la pejzaĝo laŭlonge de la rivero Meuse kaj la silueto de la fortikaĵo Dinant, kia ĝi restis en mia memoro post la kongreso de Bruselo en la jaro 1964. Invitita reprezentanti IFEF kaj GEFA mi do veturis la 5an de novembro al Belgio. Alvenante en Godinne akceptis min geedzoj de Sutter kaj s-ro Deduysche. En Naturamika Domo atendis 25 gepartoprenantoj, inter ili la FISAIC-representanto s-ro Gilles, la reprezentanto de la unuiĝo de Eŭropaj Fervojistoj, s-ro Lamperes kaj gastoj el Nederlando. Kiel mi aŭdis, oni entuziasme akceptis la inviton, partopreni komunan jarkunvenon en Clervaux en oktobro 1972. Post komuna tagmanĝo ni aŭtobusekskursis al la Ardenoj. Ni vizitis fervojistan infan-domon „Kastelo Noisy“. Tiu ĉi kastelo ne nur estas agrabla ripozejo dum la ferioj, ĝi estas speciale destinita kiel agnoskita lernejo por infanoj de gefervojistoj, kiuj devas esti for de la gepatra hejmo pro sociaj aŭ fizikaj cirkonstancoj. Ĝis 100 infanoj, knaboj inter 5 kaj 12, knabinoj de 5 ĝis 14 jaroj, trovas tie bonegan hejmon. Ni inspektis la tutan domon kaj konvinkiĝis, ke la Belgaj Fervojoj ne nur elektis taŭgan lokon, sed ke la infanoj ankoraŭ post multaj jaroj volonte vizitas la lokon, kie ili trovis

tiom favorajn vivkondiĉojn. Ĉiuj infanoj estis same vestitaj. En helgrizaj pantalonoj, verdaj anorakoj kaj ruĝaj pintĉapeletoj ili aspektis kiel pigmeoj. Kun granda plezuro ili kantis por ni. La aplaŭdo ĝojigis ilin samgrade kiel nin la afabla invito al kafotablo. Iom kurioze ŝajnas al ni la instruado, nome en flandra kaj franca lingvoj, sed tio ja estas problemo tipa por Belgio.

La dua celo de nia ekskurso estis la benediktana monaĥejo Chevetogne. Ĝi estas konstruita en la jaro 1939. Subite la vizitanto troviĝas en sentempa kaj sankta oriento. La kriptoj estas ornamita per belegaj freskoj, kiujn origine verkis greka artisto. En la monaĥeja komunumo estas ekleziuloj el ĉiuj anguloj de la mondo, kies tasko estas plua pristudo de spiritaĵoj kaj kulturaj valoroj el la oriento, i. a. la antikvaj ritoj, la liturgiaj tekstoj kaj artoj. Ili klopodas interesigi la okcidentan mondon pri la orienta kristana vivo pere de sia internacia organo „Irenikon“ kaj pere de lkonoreproduktaĵoj kaj preĝejmuziko. La gvidanto iom skeptike sekvis la interpretadon de siaj vortoj, kiujn li ĉiujn unuope komprenis. Post la oficiala rondiro li germane petis de mi klarigojn kaj tiom interesiĝis pri Esperanto, ke mi preskaŭ estus maltrafinta la aŭtobuson. Intertempe komencis pluvi, tamen tio ne ĝenis nin. Pliriĉigitaj kaj kontentaj ni atingis nian restadejon en Godinne. La vespero estis dediĉita al diapreletoj. Unue mi kondukis la spektantojn tra Ĉeĥoslovakio, poste s-ro Labordus montris diaprozotivojn pri la kongresoj Fulda kaj Varna. S-ro de Bruyne aŭdigis Eperanto-

diskojn.

Dimanĉon matene ni veturis al Dinant. En la trajno atendis nin la geedzoj Steenhout. Salutante ilin ni tre rapide atingis Dinant. Pro iom nebula vetero ni rezignis viziti la fortikaĵon kaj faris promenadon tra la antikva urbeto. Ni ĝuis prezentadon de ĉasista muzikorkestro antaŭ kaj en la preĝejo. Ili festis la tagon de sia patrono „Sankta Huberto“. Post komuna gaja tagmanĝo ni ĉiuj forlasis Dinant. En Namur la grupo disiĝis. Kelkaj personoj restis por viziti la urbon, parto de la nederlandanoj daŭrigis la vojaĝon tra Bruselo al Amsterdamo, kaj mi adiaŭis de la geamikoj por reveturi al Germanio. Koran dankon al ĉiuj por la agrabla atmosfero. Specialan dankon al s-ro de Bruyne pro la bona aranĝo de tiu ĉi kunveno, kiu bonege funkciis.

Sed specialan saluton mi direktas al s-ino de Sutter. Pere de siaj floroj, kiuj longtempe ornamis mian skribtablon, ŝi zorgis, ke la ĉiutago ne tuj anstataŭas la agrablan memoron al Godinne.

Elfriede Kruse

## FROSTAVALEN denove en 1972

Frostavallen estas idilia loko en la plej suda provinco de Svedujo, kie plurfoje okazis „Sveda Somera Semajno“ kun la konataj prelegserioj. En 1972 (30 julio — 6 aŭg.) Sveda Esperanto-Instituto denove aranĝos prelegsemajnon kun altkvalita programo. Inter la prelegantoj estos Dro Ivo Lapenna. Petu informojn pri programo kaj restadkosto de la administranto s-ro Jan Strönne, Amiralsgatan 36, S-211 55 Malmö, Svedujo.



## Vizito al la FFEA-jarkunveno.

La 22an kaj 23an de oktobro 1971 okazis la FFEA-jarkunveno en Lyon, bone vizitita de pli ol 100 gekolegoj. Inter la ĉirkaŭ 30 eksterlandaj gastoj kaj deligitoj el 6 landoj estis 4 el Germanio. La plej granda grupo venis el Italio sub gvidado de gesinjoroj Gimelli.

Nia aktiva kolego Laheurte el Lyon kaj liaj helpantoj preparis interesan programon. Sabaton, dum la franca laborkunsido, ni eksterlandanoj estis gvidataj tra la urbo kaj vizitis la katedralon kaj la du amfiteatrojn. En la fervoja kantino ni ricevis bonan prezindan manĝaĵon. Vespere ĉiuj kunvenintoj rigardis la malnovan parton de Lyon, kaj oni bone klarigis al ni la historiajn konstruaĵojn. Poste ni vizitis konatan vinrestoracion, kie la FFEA-junularo el Paris prezentis popoldancojn en diversaj kostumoj. Krome ludis kaj kantis grupon el Lyon.

Dimanĉon matene okazis la ĉefkunveno. Inter la parolantoj estis honora gasto de la fervoja administracio. Nome de IFEF parolis Otto Walder. Sinjorino Kruse salutis por la britaj kolegoj, ĉar de tie neniu povis veni kaj ŝi estis komisiita anstataŭi ilin. Krome ŝi invitis al la internacia fervojista Esperanto skisemajno kaj al la venonta komuna jarkunveno de GEFA kaj FFEA, kiu okazos en Luksemburgo de la 6a ĝis la 9a de oktobro 1972. Kiel deligito de GEFA mi esprimis mian ĝojon, ke la naciaj jarkunvenoj pli kaj pli havas internacian karakteron, kio servas al la progreso de nia movado.

La tradicia bankedo en proksima hotelo finigis ofice la jarkunvenon. S-ro Laheurte, kiu jam akceptis la eksterlandanojn ĉe la alveno, ankaŭ adiaŭis la diversajn forveturantajn grupojn en la stacidomo. Mi ankoraŭ restis 8 tagojn en Francio kaj rigardis kelkajn sudokcidentfrancajn urbojn. Entute la vizito en Lyon estis bona interesa travivaĵo kaj mi nur povas rekomendi, ke pli multaj el ni vizitu la jarkunvenojn de niaj najbaraj asocioj. Oni ja povas ligi la viziton kun parto de la ferioj.

Schindler

## Feriosemajno 1971 en Svislando

De la 5a ĝis la 11a de septembro 1971 okazis la Eŭropa-Ferio-Semajno sur FÜRIGEN apud Stansstad en Svislando. La hotelo, en kiu ni loĝis, situis sufiĉe alte super la kvarkantona lago. Ek de la hotela teraso ni havis belan superrigardon sur la lagon kun la monto „Pilatus“ en la fono. Ni estis proksimume 80 personoj. Jam sur la kajo de la stacidomo Luzern bonvenigis nin la s-anoj Hunkeler kaj Glättli. Ili vere bone aranĝis la restadon dum la tuta semajno. Ĉiutage ni faris ekskurson al iu belega loko, ekzemple fervejo al Engelberg (1002 m), aŭtobuse kaj funikulare al Stanserhorn (1849 m) kaj ŝipe al la urbo Luzern kun la konata trafikmuzeo. Tamen restis ankoraŭ sufiĉa tempo por ripozi aŭ fari promenojn en la proksimeco de la hotelo. Dum kvar tagoj eĉ estis matene okazo perfektigi la konojn en nia lingvo. Vespere ni povis aŭdi prelegojn aŭ vidi diapozitivajn bildojn. Grandan sukceson havis la amuza vespero.

La kulmino estis la lasttaga ekskurso al la ĉarma lago Aegeri. Unue ni veturis aŭtobuse tra arbariĉa ĉirkaŭaĵo kaj belaj vilaĝoj. Survoje ni vizitis la kavernojn „Infero de Baar“. Ni tagmanĝis en la gastejo „Eierhals“ kun belega rigardo sur la lagon Aegeri. Granda surprizo estis, ke ni faris ankoraŭ rondveturadon sur la lago mem.

Ĉiuj bedaŭris, kiam ni estis alvenintaj ĉe la stacidomo Luzern, ke nun estis fino de la belaj tagoj. Kun multa danko en la koro por la sukcesplena restado sur FÜRIGEN ni adiaŭis niajn ĉiam ĝentilajn kaj atentemajn semajngvidantojn.

JS

## Preskaŭ 3000 varvagonoj ŝtelitaj

La usona polico FBI provas eltrovi, kien malaperis ne malpli ol 2800 varvagonoj, kiuj apartenis al diversaj fervojaj kompanioj. 277 el ili oni intertempe retrovis en riparejo kaj manovra stacio de la „La Salle-fervojo“, 160 kilometrojn for de Chicago. Tiu fervojo havas nur 25 kilometrojn da trakoj kaj pro tio estas unu el la plej malgrandaj privataj fervojoj en la mondo. En ĉi tiu riparejo oni pentris la vagonojn laŭ la koloroj de tiu „La Salle-fervojo“ kaj donis al ili aliajn numerojn. Poste oni forluis ilin por 3 dolaroj potage al aliaj fervojaj kompanioj, plej ofte al tiuj, de kiuj la vagonoj antaŭe estis ŝtelitaj. Tiamaniere oni supozeble enkasigis jare proksimume du milionojn da dolaroj. Komentario: Oni nur havu ideojn.

trad. el „Herzberger Zeitung“ de J. Gießner

Redaktiĵo por n-ro 2/1972 estas la 25. 3. 1972.



## Münster/Westfalen Esperanto in Schulen?

### Osnabrücker Regionaltreffen fand viele Freunde

„Dank der internationalen Sprache habe ich Osnabrück und seine Bewohner kennen- und liebgelernt.“ Das schrieb IFEF-Mitglied Forslund aus Skeftea (Nordschweden) in einem Grußwort anlässlich eines Regionaltreffens, das die Esperanto-Vereinigung Osnabrück in Zusammenarbeit mit dem Verband Deutscher Esperanto-Lehrer in der Gaststätte am Schloßgarten veranstaltete.

Viele Freunde der internationalen Sprache waren nach Osnabrück gekommen. Interessant war eine umfangreiche Buchausstellung, in der ein vielseitiges Angebot esperantosprachiger Literatur angeboten wurde. Auch die internationale Hilfsorganisation Terre des Hommes hatte esperantosprachige Werbeschriften ausgelegt.

Vorsitzender Otto Rösemann (GEFA-Sekretär) eröffnete die Tagung. Sein besonderer Gruß galt den Ehrengästen: Beigeordneter Ernst Weber, Ratsherr Dr. Erdmann, Willi Brandenburg (Vorsitzender der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten), Helmut Klünder (Vorsitzender der Deutschen Esperanto-Jugend). Das gute Verhältnis der Esperantogruppe Osnabrück mit Rat und Verwaltung hob Rösemann besonders hervor.

Beigeordneter Ernst Weber erklärte in seinem Grußwort, er habe sich bereits vor Jahren mit Esperanto beschäftigt, die Politik jedoch habe zuviel Zeit erfordert. Osnabrück sei eine schulfreundliche Stadt, und es wäre eine gute Idee, wenn versucht würde, die


## Distrikt-komisiito en Regensburg

Jam dum miaj junulaj jaroj interesis min Esperanto, ĉar mi ŝatas kompreniĝon inter la popoloj.

Mi estas konvinkita, ke nur neŭtrala kaj facile lernebla lingvo kiel Esperanto estas taŭga por ĉiamdaŭraj internaciaj rilatoj.

Ĉe mia dejora restado en Passau en la jaro 1959 mi havis la okazon frekventi Esperantokurson.

Ek de tiu tempo mi okupas min regule pri Esperanto. En la jaro 1963 mi aranĝis kune kun miaj samideanoj



Vitus Röder

la 7an jarkunvenon de GEFA en Regensburg.

Dum la lastaj jaroj mi ankaŭ gvidis E-kurson por komencantoj. Kelkfoje mi partoprenis kongresojn kaj la feriosemajnojn en Svislando kaj Nederlando. Laŭ displonebla tempo mi korespondas kun samideanoj.

Ĉar nia kara kolego König en Weiden emeritiĝis, mi transprenis la oficon de komisiito por la distrikto Regensburg. El tuta koro mi deziras, ke la kompetentuloj fine ekkonos la valoron de Esperanto kaj enkondukos ĝin en ĉiuj lernejoj.

Schulen für Esperanto zu interessieren.

Lehrer Hermann Behrmann (Löhrne), Autor des Lehrbuches „Esperanto programita“, hat in kurzer Zeit mit seinem Werk einen guten Erfolg gehabt. Das 5000. Exemplar überreichte er dem Schulausschußvorsitzenden Ernst Weber.

Ein Grußwort hatte auch Dr. Bormann, Hamburg, der Präsident des Deutschen Esperanto-Bundes, übersandt. Ein weiterer Gruß kam aus Südwestfrankreich. Die Esperanto-Gruppe Charente blickt mit Interesse nach Osnabrück. Weitere Grüße kamen aus Haarlem. Dort hofft man, daß die Kontakte verstärkt werden. Auch die Gruppe Angers übersandte Grüße.

Zu dem Thema „Einführung der internationalen Sprache Esperanto in die Schulen“ referierte Lehrer Hermann Behrmann. Ulrich Brandenburg (Westbevern) übersetzte den in Esperanto gehaltenen Vortrag. Ausführlich erklärte er, daß eine Fremdsprache leichter erlernbar sei, wenn der Schüler Esperanto beherrscht. Gründe hierfür seien die überschaubare Grammatik, die Wortbildung und die weitgehende Übereinstimmung mit der deutschen Sprache.

Willi Brandenburg (Vorsitzender deutscher Eisenbahner-Esperantisten) erläuterte die Zweckmäßigkeit der internationalen Sprache für Eisenbahner. Auf vielen Gebieten wenden die esperantosprechenden Eisenbahner ihre Sprache an und knüpfen dadurch freundschaftliche Beziehungen mit ausländischen Kollegen. In Fachvorträgen bei internationalen Tagungen können sie das Fachwissen erheblich erweitern.

Pilo-Press



## El la grupoj

**Wuppertal/Hagen**

**(Vestfalia)**

**Zamenhoffesto kaj  
GEFA-distriktkunveno**

La 12-an de decembro venis pli ol 80 esperantistoj ne nur el la distrikto Wuppertal, sed ankaŭ el la fervojaj distriktoj Essen, Köln, Münster kaj Nürnberg. En la pasintaj jaroj ni GEFA-anoj kelkfoje estis gastoj en Wuppertal kaj Schwelm en la rondoj de tiaj esperantistoj. Kolego Hermanns, la forta motoro de la grupo Hagen, invitis por la 16a horo, kaj kun ĝojo oni povis konstati, ke la granda DB social-restoracio, proksime de la ĉefstacidomo, je tiu horo jam estis plena.

Kun multe de amo kaj sindonemo por nia komuna ideo Peter Hermanns kaj la multnombraj Gehelpantoj preparis la aranĝon, prizorgis ekspocizi-materialon, invitleterojn, filmon el Norvegio kaj ornamis la salonegon. Hans-Werner Knötzsch salutis la gastojn, inter ili ĉefinspektoron Berndt — sekciestro. A de la BSW Wuppertal —, GEFA-prezidanton Willi Brandenburg kun familio, s-ron Behrmann el Löhne kaj la fotoraporistonon de la BSW-grupo Wuppertal. Kelkaj kolegoj sendis saluletterojn dezirante multe da sukceso al la aranĝo. La ambasadoro de Aŭstralio, s-ro Ralph Harry, sendis siajn bondezirojn kaj anoncis sian viziton komence de 1972. Per disko ni aŭdis la budapeŝtan fervojan Esperanto-horon, kiu kantis la hymnon „La Espero“. Post komuna kaftrinkado kun kuko el la fervoja restoracio raportis GEFA-distriktestro Wilhelm Graß pri la diversaj Esperanto-aranĝoj en la jaro 1971. Graß in-

formis la gastojn pri la fakaj aranĝoj kaj klopodoj de IFEF kaj GEFA kaj pri la sukcesoj en la propra distrikto. Willi Brandenburg salutis nome de GEFA-estraro kaj pritraktis la diversajn manierojn por disvastigi Esperanton. S-ro Behrmann parolis pri sia propra programo „Esperanto en la lernejoj“ kaj aliecgis sian unikan varbmetodon.

Kun granda plezuro akceptis la publiko la norvegan sonfilmon „Ni estis tie“.

La NSB montris vojaĝon tra la belegaj Fjordregionoj tradukitan de P. J. Krogstie. Post la vespermanĝo grupano Heinz Schindler montris sian kordia-serion „Vojaĝo ĉirkaŭ la mondo“. Kiel premio por bona kunlaboro en la Esperantogrupo Gertrud Jira kaj Anneliese Köhler el Schwelm ricevis la libron „La kombilo“ de la itala Esperanto-verkistino d-rino Lina Gabrielli. S-ino Hermannskajs-inoKnötzsch el Hagen ricevis la Espe-

ranto-florkalendaron por bona preparado de la Zamenhoffesto.

Finfine oni povas konstati, ke la aranĝo vere estis granda sukceso. Tion kaŭzis ne sole la programsinsekvo (alparoloj, salutoj de gastoj, laŭtleĝo de jarporto, prezentado de diapozitivaj kaj filmo); devige la programoj de tiaj aranĝoj similas unu la alian, la sukcesrecepto de la grupanoj de Hagen estas la maniero, kiel interesigi la homojn kaj poste — multe pli grave! — teni ilin. Graß

**Augsburg.** Festi jubileon, tion sendube la esperantistoj de Augsburg bone scias. Gratulon do al la E-grupo de Augsburg pro la 50a datreveno de ĝia fondiĝo, kaj gratulon al Hermann Schmid pro la sukcesa aranĝo la 5 dec. 71 en la sindikata domo. Kunvenis ĉ. 100 esperantistoj el tuta Bavario kaj kelkaj honorajgastoj, kiel la urbestro Breuer, kiu en la nomo de la magistrato kaj en la nomo de la ĉefurbestro gratulis kaj salutis. Li montris sin bone informita pri la evoluo de la E-movado en Augsburg. Krome ĉestis la lerneja konsilisto d-ro Nübling, la direktoroj de la universitata kaj urba bibliotekoj. Senditaj estis ankaŭ leteraj kaj telegramaj salutoj, inter ili de Ralph Harry, aŭstralia ambasadoro en Bonn, kiu esprimis sian simpaton por la laboro de la bavaraj esperantistoj.

La festparoladon faris d-ro Werner Bormann, Hamburg, pri la eŭropa lingva problemo, kiu trovis grandan atenton. IFEF-prezidanto Joachim Giessner, Herzberg, parolis pri lingvaj bezonoj kaj realaĵoj en la internacia fervoja trafiko. Multnombra fervojista kantĥoro de Buchloe prezentis

### Nekrologo

En aĝo de 83 jaroj forlasis nin la 11-an de oktobro 1971 nia fidela membro en Kirchheim/Teck

### Hermann Fischer

BAmtm. a. D.

nask. 9. 11. 1888

Ek de 1910 li regule okupis sin pri Esperanto, unue en Berlin kaj poste en la distrikto Stuttgart. Malgraŭ sia aĝo li legis multajn librojn kaj estis bone informita. Post longa grava malsano li nun trovis eternan ripozon.

GEFA funebras kun la familio, al kiu ni sincere kondolencas.



plaĉajn kantojn en Esperanto. Kiel jam en antaŭaj kunvenoj de sudbavaraj esperantistoj gimnazia profesoro Ludwig Thalmeier, Landshut, prezentis lumbildpreleĝon pri siaj vojaĝoj sub la titolo „Esperanto-vivas!“

Ne mankis juna elemento. Protest-kantoj en Esperanto prezentis gestudentoj de la pedagogia altlernejo de Augsburg, Rita Högel kaj Joseph Maria Ipfelkofer. Kaj Steffi Tucker pianlude akompanis la sorĉaĵojn de amatora sorĉisto.

Libroservo Ludwig Pickel ekspoziciis kaj vendis E-librojn. Videblaj estis ankaŭ kelkaj E-filatelajoj!

Pilo-Press

**Frankfurt.** La loka Esperanto-societo kune kun la fervojistoj aranĝis antaŭkristfestan kunvenon je sabato, la 11a de decembro 1971 en Haus Dornbusch. Post enkondukaj vortoj de s-ro Ritterspach oni komune kantis — subtenite de s-ino Ritterspach ĉe piano — kristfestajn kantojn. Ĉefa ero de la vesperprogramo estis vojaĝraporto de gesoroj Hirsch el Bad Hersfeld pri vojaĝo tra suda afriko. Kolora filmo de preskaŭ unu horo, poste multege da diapozitivaj, ĉio kun tre sperta komentario: unike instruiga programo laŭ vidpunktoj geografia, politika, antropologia, folkloraj kaj kutuparte interesa por filmkaj fotoamatoroj.

**Offenbach.** Laŭ iniciato de s-ro Denk okazis la 1an de decembro varbkunveno en la popolkleriga domo. Antaŭ plena salono d-ro Lang skizis la celojn de internacia lingvo kaj kial oni ĝin bezonas. S-ro Ritterspach klarigis la esencajn trajtojn de Esperanto laŭ vorttrezoro, gramatiko, esprimkapablo kaj taŭgeco

kiel faka kaj traduka lingvo. Post nelonga diskutado s-ro Mager montris diapozitivajn pri Esperanto-poŝtmarkoj kaj s-ro Ritterspach pri fervojistaj kongresoj dum la lastaj dek jaroj.

### **Wuppertal**

Dimanĉon la 12-an de marto 1972 la Esperantistoj de Rejnlando kaj Vestfalia renkontiĝis en Wuppertal-Elberfeld, Auer Schulstr. 9 en „Jugendzentrum Elberfeld“ je la 8-a ĝis vespere (inter alie REVELO-Kunveno je la 10-a horo). Bona ebleco praktiki Esperanton, partopreni Esperanto-rondon! La kunvenejo troviĝas proksime de la stacidomo (8 minuta piedvojo); en la stacidoma tunela elirejo pendas sur la dekstra muro urbplano).

### **Kial vi lernis Esperanton?**

Certe ne nur por interŝanĝi poŝtkartojn, por surporti plian insignon aŭ por originale pasigi tempon!

Sed vi lernis Esperanton por havi senperajn rilatojn kun samideanoj el la tuta mondo; por ekkoni opiniojn, pensojn kaj aspirojn de alilandaj amikoj; por ekkoni kulturon kaj vivon de aliaj regionoj; por antaŭenpuŝi ĉiujn fortojn, kiuj luktas por paco, interkompreno kaj solidarsento inter ĉiuj homoj; por starigo de demokratio kaj paca kunvivado en la tuta mondo.

### **La estraro informas**

La laborkonsilantaro kunsidis al 4-an de decembro 1971 en Mainz kaj pritraktis organizaĵajn aferojn, okazantaĵojn, IFEF-aferojn kaj varbadintencojn.

La venonta laborkunsido kun la distrikt-komisiitoj okazos la 25-an de marto 1972 en Frankfurt/Main. Bulteno 2/1972 aperos en pli granda amplekso kiel varb- kaj informilo Esperanto/germanlingve.

### **Fonduso Olimpiaj — Ludoj en Munkeno**

Por eldoni kaj senpage disdoni Esperanto — broŝuron al sportistoj dum la Olimpiaj — Ludoj en Munkeno estas starigita „Fonduso — Olimpiaj — Ludoj“ en Munkeno!

Protektanto de la fonduso estas Ambasadoro Ralph Harry, Australische Botschaft, 53 Bonn-Bad Godesberg, Kölner Straße 107.

La Esperanto — organizaĵoj kaj unuopaj esperantistoj estas petataj kontribui per mondonaco al la fonduso. La donacoj estas publikigitaj en „Pilo-Press“ kaj en „GER“.

Donacojn sendu al Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 2, Postfach 2113.

Konto ĉe la Stadtparkasse Nürnberg n-ro 1960149, oni ankaŭ akceptas ĉekojn! aŭ Stadtparkasse Nürnberg, 85 Nürnberg, Postscheckkonto Nürnberg n-ro 16.

Bonvolu citi sur la poŝtĉeka ĝitilo: Zugunsten von L. Pickel, Fonduso O L, Konto 1.960,149. El „Pilo Press“

### **La redaktoro petas vin**

post 5-jara laborperiodo vi certe permesas al mi peton:

1. malgraŭ ke mi disponas pri sufiĉe da materialo mankas raportoj el la grupa vivo kaj pri aranĝoj el la distriktoj. Aliflanke nia Bulteno nur parte taŭgas por komunkado de templimigitaj anoncoj de viaj aranĝoj, ĉar la tempo inter redaktado kaj livero daŭras ĉirkaŭ unu monaton;
2. skribu maŝine (kun kopio) kun 1/2 linia interspaco en taŭga Esperanto aŭ germanlingve kiel eble plej sen manskribitaj korektoj;
3. distribuu nian informilon tuj post la akcepto de nia Bulteno-dissendanto (validas por la komisiitoj kaj la distribuatoj).



## Estraro kaj komisiitoj de la unuigo Germana Esperanto Fervoja Asocio en la Sociala Organizo de Germana Federacia Fervojo

Stato: Januaro 1972

### Estraro

**Prezidanto:** TBOI Brandenburg, Hbm Münster (Westf.); Basa 945/397 aŭ 1391

**Vicprezidanto:** BAmtm Gießner, Bf Herzberg (Harz); Basa 949/887/391

**Unua sekretario:** BOI Rösemann, BD Münster (Westf.) - V-Büro - V 38; Basa 945/417

**Dua sekretario:** BHS'in Kruse, Sozialamt Frankfurt/Main; AA 517; Basa 955/3280

**Redaktoro:** BAmtm Graß, BD Wuppertal -T-Büro T 101-; Basa 946/468 aŭ 1407, privata adreso: 565 Solingen 11, Meteorstr. 13

**Kasisto:** BHS a. D. Jentsch, Bf Ober-Ramstadt ĉe Darmstadt

### Apartaj komisiitoj

**Lingvaj ekzamenoj:** BOAR Dr. Lang, Pa bei der BD Frankfurt/Main; Basa 955/1501

**Instruado:** BOAmtm a. D. Jäger, 6 Frankfurt/Main, Felix-Dahn-Str. 6; poŝtelefono 515123

**Fakterinaroj:** BAmtm Ritterspach, ZVL Frankfurt/Main, AA 5525; Basa 955/4824

**Junularaferoj:** BS Hegenberg, Bf Bredenscheid (Wuppertal); Basa 946/651/23

**Biblioteko kaj gazetkolektado:** BOI Rösemann, BD Münster (Westf.) - V-Büro - V 38; Basa 945/417

**Bulteno-dissendo:** BOS Schindler, Bf Schwelm (Wuppertal); Basa 946/848/388

### Hispanaj Ŝtatifervojoj

**(RENFE).** La hispana ministro-konsilantaro aprobis la konstruon de nova fervojlinio, kiu kunligos la urbon Barcelona kun sia 11 km fora flughaveno. La trajnoj dumtage veturu ĉiun kvaronhoron, veturdaŭro antaŭvideble 12 minutoj. Surstrate oni nuntempe bezonas ofte tutan horon...

**Svedaj Ŝtatifervojoj (SJ).** Grandskala eksperimento celas kontraŭigi someran danĝerkaŭzon por fervojaj trakoj: oni pentros la relojn per blanka farbo, esperante ke blankigitaj reloj somere ne tiom varmiĝas kaj sekve malpli multe dilatiĝas.

**Arkivo:** BOS Barmaneter, Bf Woringen (Schwaben - Bez. München); Basa 964/824/365

### Distriktkomisiitoj

**Essen:** BOAmtm Schnetzer, Bf Hamm (Westf.); Basa 944/807/391

**Frankfurt/M:** BOAR Dr. Lang, Pa bei der BD Frankfurt/Main; Basa 955/1501 und 5788

**Hamburg:** BAmtm Lepke, BD Hamburg - B-Büro -; Basa 947/1581 aŭ 5569

**Hannover:** BHS Heimlich, Bm Soltau; Basa 949/850/127

**Karlsruhe:** BAmtm Hug, BD Karlsruhe - Ps-Büro -; Basa 953/5005

**Kassel:** BHS Tasler, BD Kassel - Ps-Büro Ps 82 -; 957/1259

**Köln:** BOI Herlitze, BD Köln, Büro B (Ozl); Basa 943/473

**München:** B.Arb. Schmid, München Hbf; Basa 962/2040/2041

**Münster:** BAmtm Schropp, BD Münster (Westf.) - P-Büro - P 6; Basa 945/1171

**Nürnberg:** BHS Müller, Bahnpolizeiwaiche Bamberg, Bp-Posten Lichtenfels; Basa 966/844/388

**Regensburg:** TBOI Röder, BD Regensburg - T-Büro - Th 8; Basa 965/1401

**Saarbrücken:** BHS Haupenthal, Ga Saarbrücken Hgbf; Basa 956/429

**Stuttgart:** TBAmmt Krüger, Flm Heilbronn; Basa 952/822/379

**Wuppertal:** BAmtm Graß, BD Wuppertal - T-Büro T 101 -; Basa 946/468 aŭ 1407

ĝantoj estos je dispono kun etaĝaj panoramvagonoj kun elrigardkupolo. Rit.

### Peto al la eksterlandaj geamikoj!

Ĉi maldekstre ni komunikas la aktualan adresaron de la GEFA-estraranoj kaj de la distrikta komisiitoj. Bonvolu korekti vian liston kaj eventuale ŝanĝi la preparitajn adresojn por garantii la akuratan akcepton. Se vi mem havas dezirojn rilate la akcepton de nia BULTENO, ni urĝe petas informi nian unuan sekretarion, s-ro Otto Rösemann.

### Anonco

Tutkore ni dankas por ĉiuj salutoj kaj bondeziroj, kiuj atingis nin, ĉefe la redakcion, okaze de la pasintaj festotagoj. Germana Esperanto Fervoja Asocio.

### Renkontiĝo dum Foiro en Leipzig 1972

Dum la foiro de Leipzig okazos renkontiĝo de esperantistoj la 11-an de marto je la 19,30 horo en klubo de l'inteligentularo „Gottfried-Wilhelm-Leibnitz“, Elsterstraße 35.

### Hungario

Hungara Esperanto Asocio invitas al Esperanto-semajno sub aŭspicio de UEA inter la 17-a kaj 23a julio 1972 en la ĉefurba kulturdomo, Budapeŝto VI. Detalan informon petu ĉe: Hungara Esperanto Asocio, Budapeŝto 5, poŝtako 193.

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen 11, Meteorstraße 13. Druck / preso: Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH., 8500 Nürnberg, Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanto Fervoja Asocio.